

Núm. 6

JUNIO 1949

Ruzafa, 7
VALENCIA
(ESPAÑA)

¿HASTA CUANDO..?

Por si fueran pocos los quebraderos de cabeza que acucian a los componentes de la O. N. U., ahora surge uno nuevo, y no despreciable.

Se trata de un asunto que parece baladí, pero que bien considerado, no lo es.

El idioma español ha ganado una justa batalla en las reuniones internacionales. Se le acaba de admitir como tercer idioma «de trabajo». En San Francisco solo fueron admitidos el francés y el inglés, debido a lo engorroso y caro que resultaría admitir además el ruso y el chino para todos los trámites administrativos. En 1947, a propuesta del delegado filipino, se presentó la demanda de que fuese considerado el español como idioma «de trabajo»; la proposición fué obstaculizada por el Secretariado, al tomar en consideración las razones económicas que desaconsejaban tal medida. Por fin, la unión de los países iberoamericanos, con ayuda de otros doce, entre ellos los países de lengua árabe, han conseguido la victoria.

Ahora bien, juzgando con imparcialidad el asunto, hemos de reconocer que, si bien el español ha ganado una justa victoria, también podrán reclamar los mismos derechos los árabes, que representan una respetable cantidad de millones de seres. No menos atendible sería la pretensión de los indostánicos o de los rusos, si alegan el mismo motivo. Y así, al cabo de algunos meses o años, si nó se ha desmoronado violentamente la organización de las Naciones Unidas, muy bien pudiera ocurrir que se viniese abajo por la simple corrosión de sus cimientos, debido al caos lingüístico y al deseo, en el fondo muy legítimo, de no supeditarse nadie a la férula insoportable de un idioma extranjero.

Hace cincuenta años, el francés era admitido por todos como idioma oficial diplomático. Desde Versalles, el inglés ha ído conquistando la paridad; ahora el español; luego... ¿quién sabe?

Y he aquí el hecho paradójico; por la pretensión puramente nacionalista de todos no habrá más remedio que aceptar «a fortiori», una lengua neutral internacional. Y no dejará de tener gracia....

Lo que ya no tiene tanta gracia, es el hecho, desgraciadamente olvidado, que el Secretariado de la Liga de Naciones emitió el siguiente informe, en el año 1922. «Hemos presenciado el caso de la Conferencia Internacional de Educación, cuyos debates se han verificado en Esperanto. Nos ha llamado la atención la facilidad y la rapidez con que los delegados de todos los países expresaban sus ideas y se comprendían mutuamente; las discusiones no eran interrumpidas por las traducciones. Treinta y dos oradores fueron oídos en una sola sesión, y se obtuvo una labor, durante tres días, que hubiera necesitado diez si se hubiesen empleado distintos idiomas oficiales. La pronunciación del Esperanto parece muy uniforme, y más fácilmente adquirible que la del francés o inglés. Si alguien hubiese entrado en la sala sin estar advertido, hubiese creío oir una discusión en portugués o rumano. El Esperanto pone a todos al mismo nivel y permite a un delegado de Pekín o de La Haya expresarse con la misma energía que sus colegas de París o Londres».

En pocas palabras, en la O. N. U. continúan alumbrándose con velas de sebo, cuando ya en 1922 la Sociedad de Naciones había descubierto la electricidad.

¿QUOUSQUE TANDEM...?

Flugi per aviadilo, de lando al lando, estas brila sukceso de la tekniko; sed veturi tiel rapide sen la garantio de normala komprenebleco, pro la lingva konfuzo, estas brua fiasko de la logiko. Tial, krom alta idealo, Esperanto estas perfekta instrumento teknika por logika solvo de grava problemo!

RAKONTETO

DE

Santiago Ramón Cajal

Se por la ideo de Esperanto utilas la ideoj de elstaraj sciencistoj, jen do nun la glora nomo de la eminenta doktoro Santiago Ramón Cajal, de kies literatura verkaro (ombrumita pro la brilo de lia famo sur la kampo de la medicino) ni represas la tradukon de tre oportuna fragmento

Okaze de la domaĝa lingva diverseco, mi ekmemoras jenan rakonteton: Du kuraĝaj sciencaj esploristoj interniĝis en profundan kavernon, kiun ili eniris tra malsamaj enirejoj. Antaŭ ol malkovri la misteron de la groto, unu el ili falis teren; pro la puŝo estingiĝis lia lanterno; post leviĝo li rimarkis kun teruro, ke perdiĝis la siliko, la frapofero kaj la tindro. La mallumo estis absoluta, ĉiu paŝo antaŭen treege danĝera. Al la alia esploristo, kiu kvarpiede penadis en kontraŭa direkto, okazis simila akcidento: li perdis la lanternon, kvankam konservis la tindron kaj la silikon Vagante tra la mallumo, kaj eligante ŝirantajn lamentojn, fine ili ambaŭ renkontiĝis.

—Mi posedas lanternon! —diris unu.

—Mi perdis la torĉon, sed restas al mi la siliko, la tindro kaj la frapofero— respondis la alia.

Tiam, rimarkinte ke ili parolis malsamajn lingvojn, kaj tial do ili apartenas al malsamaj nacioj, venis al ili diabla penso. Car avidaj gajni por sia patrujo la ekskluzivan gloron de la eltrovo, ili ekbatalis por alproprigi al si reciproke la lanternon kaj la bruligilojn.

Implikitaj en absurda lukto, ili enfalis en teruran profundegaĵon, kie —ho, ironio de la sorto!— ili mortis brakumitaj.

Interdume, la impona enigmo de la kaverno (legu: Universo) daŭris sen deĉifro, dank'al la ambicio kaj stulta malamo de tiuj esploristoj, obstinaĉaj paroli malsamajn lingvojn.

Elhispanigis E. GUILLEM

Esperanto-Press

Kvankam tiu ĉi informa servo, kies sidejo troviĝas en Zürich (Svislando), tute similas al la konataj gazetaro-agentejoj, ĝi tamen ne egalas al ili, ĉar ĝi uzas nur unu solan lingvon: Esperanto! Per tiu aranĝo, ĝi feliĉe solvis la lingvan problemon, kiu tiom malfaciligas la internacian vivon.

La «Svisa Bulteno» de Esperanto-Press diskonigas en la tuta mondo informojn pri la komerco, la industrio, la turismo kaj la kultura vivo de Svislando. Aliaj bultenoj aperas kun informoj pri aliaj landoj, ekzemple pri Brazilo, tial, ke Esperanto-Press estas vere internacia entrepreno. Per la uzado de Esperanto, kiel sola lingvo, ĝi plisimpligas sian korespondadon al minimumo kaj tamen atingas la tutan mondon, ĉar Esperanto ja estas bone konata en ĉiuj landoj de la tero. Tion pruvas, cetere, la «Esperanto-Asocio de la Jurnalistoj», kiu fondiĝis antaŭ nelonge en Göteborg (Svedio) kaj al kiu aliĝis redaktoroj kaj ĵurnalistoj el 32 landoj.

La graveco de tiu informa servo «per Esperanto» estas substrekita de la fakto, ke ĝi estas oficiale rajtigita havi specialan reprezentanton ĉe la Informa Centro de la Unuiĝintaj Nacioj en Genevo. Por la unua fojo la tutmonda gazetaro ricevas nun informojn «pere de Esperanto» pri la grandaj internaciaj konferencoj, kiuj provas rekonstrui Eŭropon kaj pacigi la mondon. Je la servo de la internacia gazetaro, Esperanto fariĝis jam fakto tute atentinda.

ESPERANTO - PRESS
Mühlebachstrasse 47
Zürich 32, Svislando

FACETAS DEL MOVIMIENTO ESPERANTISTA

● SUECIA.—El Esperanto se extiende de tal manera en los países escandinavos, que ya se anuncian productos comerciales en esta lengua, para hacerlos más simpáticos a los numerosos esperantistas que pueblan la península. Así, la gran fábrica Teddy, de Malmö, anuncia a toda página, en la revista «Manufakturisten», sus últimas novedades.

● ALEMANIA.—El Instituto para Ciegos de Marburg ha elegido el método de Karl Vanselow con el objeto de editarlo en el sistema Braille, para que los ciegos aprendan Esperanto según dichos método y sistema.

En las zonas occidentales de Alemania son 95 las escuelas públicas que enseñan Esperanto a sus alumnos.

● INGLATERRA.—Una de las más importantes asociaciones laboristas de la Gran Bretaña, la de Ferroviarios, ha pedido al Congreso de las Trade Unions y al Gobierno que el Esperanto sea enseñado obligatoriamente en las escuelas, para que todos conozcan, además del inglés, la lengua internacional.

● FINLANDIA.—Durante el verano pasado tuvo lugar en Jämsä un curso de Esperanto para estudiantes y huéspedes de otras naciones escadinavas. A pesar de las difíciles condiciones de vida, asistieron 144 finlandeses y 41 extranjeros, que siguieron con gran provecho el ciclo de conferencias que duró 10 días.

● SUDAFRICA.—El Movimiento Cristiano Estudiantil, que cuenta con numerosísimos socios, ha comenzado la publicación de obras religiosas, a dos columnas, en una de las cuales se puede leer el contenido en Esperanto.

● CHINA.—El importante diario chino «Ta-Kung-Pao», al referirse al Esperanto, declara muy útil la publicación del libro «The World Interlanguage». También se ocupa favorablemente el periódico chino publicado en inglés «The China Press», y la agencia de noticias «Hua-Ming». El doctor J. B. Kao, Jefe del Departamento de Educación de la Oficina Católica de Shanghai, dice: «El Esperanto es una lengua neutral que sirva de puente, no solo entre distintos grupos de lenguas, sino también sobre prejuicios y recelos nacionales...»

● CUBA.—La Universidad de verano de La Habana incluye en su programa un cursillo, que durará desde el 4 de Julio hasta el 13 de Agosto, con una intensidad de cinco horas por semana.

● ESTADOS UNIDOS.—Sabida es la lenta progresión del Esperanto en Norteamérica; la cosa es obvia, puesto que el aluvión humano que allí llega no tiene más remedio que usar el inglés, que pasa a ser allí a modo de un lenguaje internacional. Pero los norteamericanos, sea cual sea su origen, necesitan relacionarse con extranjeros residentes fuera de los Estados Unidos o con otros que, aun residiendo allí, no han podido aprender el inglés. Ello les mueve a interesarse por el Esperanto ante la imposibilidad de aprender «todos» los demás idiomas. Y así ocurre que, en la Escuela de Minas de Missuri se estudia la lengua internacional; su biblioteca contiene muchos libros en esta lengua, se radian constantemente programas acerca de ella, y los periódicos publican frecuentemente noticias del movimiento esperantista.

En Denver, el Profesor Solzbacher dió una conferencia durante el Congreso de estudiantes católicos de Prensa.

El «New York Herald Tribune» ha publicado dos largas cartas acerca del Esperanto. Una era de Mark Starr, Director de Educación, demostrando la enorme utilidad del Esperanto para relacionarse con los japoneses, con los cuales convivió, en calidad de consejero del general Mac Arthur. La otra carta era del doctor Solzbacher, que encomiaba la utilidad del Esperanto para los programas de Radio, y las ventajas que reportaba su enseñanza en las escuelas.

En la Universidad de Seattle, el profesor Richardson dirige un curso de Esperanto, y el señor Carlson, diversos cursos públicos en dicha ciudad.

LA PRATEMPA HOMO, EN SIA KAVERNO, VIVIS BONE SEN ESPERANTO

Jes, ankaŭ sen elektro, sen telefono, sen radio nek aviado, sen miloj da pliaj tre simplaj kaj tamen treege utilaj rimedoj, antaŭ ne tro multe, vivis feliĉe la homoj. Sed nur pro tio, ke ili ankoraŭ ne konis la avantaĝojn, kiujn liveras la posedo de tiuj grandiozaj eltrovaĵoj de la moderna tekniko. Blindulo ankaŭ ridas kaj ĝojas en la vivo... kvankam, por vidanto, la vivo de blindulo estas kompatinda vivo, kiel fakte ĝi estas. Tute same, en afero tiel grava, kiel tiu de la interkompreno, oni povas ŝajne vivi bone, sen scio pri la ekzisto de Esperanto, aŭ sen sperto pri ĝia granda utilo.

La somera suno jam forte premas. La lumo estas inkandeske blanka. La kampoj aspektas kvazaŭ tapiŝoj. Sur fono de maturaj tritikaj spikoj, ŝajnas gutoj de sango la rubenoj de multaj kaj multaj papavetoj. En mezo de tia medio, estas rafinita kaj tamen tre sana volupto sidi kaj ripozi sub la freŝa ombro de fortika arbo. Tie oni povas agrable filozofadi en dolĉa nenionfarado; sed, pro la konkreta tasko legadi la ricevitajn gazetojn, mi devas pli diligente uzi la tempon kaj profiti la tagon, ĝis venos la nokto kun sia steloza mantelo. Nur tiam mi emas kviete mediti kaj pensi pri la homa efemera ekzistado, kaj nur tiam mi plene komprenas la valoron de la homa vivo, se oni ĝin scias ornami per la spirita enhavo de altaj kaj noblaj idealoj. Ne gravas se filistro riproĉas min, ke ekstaze rigardi la misteron de nokta ĉielo, aŭdante la kanton de enamiĝema najtingalo, aŭ ebriiĝi en simfonio de blindigaj koloroj, dum tago, aŭdante la cikadojn senĉese grincadi, ne donas aŭtoritaton por fari tro arogajn asertojn. Sed... mi povas emfaze rediri, ke per legado de la esperantista gazetaro, venanta el plej diversaj landoj, rekte mem de modestaj rondoj de bonintencaj homoj, kaj ne de burokrataj oficejoj de luksaj kancelarioj, oni ja povas multe pli lerni ol per englutado de tiuj pilolojl, kiujn konkurence rekomendas la ĉiutagaj ĵurnaloj kaj la ĉiuhoraj radiodisaŭdigoj... Nu, ili diru kion ajn; mi legas kaj refoje legas la hejmecan prozon de niaj gazetoj. Kaj se ne tro multe mi vin jam enuis, ho kara leganto aŭ ĉarma legantino, bonvolu do atenti nun la etan resumon de ĉio, kion ĵus mi legis laŭ sekvanta vico:

INTER LA PROZO DE I

Salutinda estas la reapero de L'ESPERANTO, informilo de Itala Esperanto-Federacio; kun ĝojo mi volas registri tiun fakton unuavice; la italaj amikoj senlace sin dediĉas al la reorganizado de nia movado en tiu lando, kie la entuziasmo estas karakteriza signo. En rubriko pri la vivo de la lokaj grupoj, oni vidas la forton de nia afero ĉie en la lando. Sub titolo «Harmonio kaj Unuiĝo» estas grava artikolo kolektive verkita de gelernantoj el lasta kurso en Milano; mi prenas pinĉe la finajn vortojn de unu paragrafo: «Nu, karaj amikoj, ĉu vi ne pensis jam, ke la sukceso nia dependas de la unuiĝo de niaj fortoj, samtempe kaj harmonie agantaj kune?». Denove LA PONTO, oficiala revuo de la germana Asocio, nin vizitas; ĝi estas presita sur bona papero; la presliteroj, kvankam treege malgrandaj, estas tre klaraj kaj belaj. En daŭrigaj etapoj aperas la statuto de la nova Akademio; oni sciigas ankaŭ pri la favora helpo, kaj eĉ mona subvencio al Esperanto, fare de aŭtoritatuloj el diversaj zonoj de Germanio, de kie venas interesaj raportoj. LA JUNA VIVO, tiu simpatia organo por la junularo, kaj amikoj de la junularo, daŭrigas kuraĝe kaj brave sian taskon inter la juna samideanaro, kiu estas iomete strabe rigardata de kelkaj *veteranoj* pro tio, ke la junaj esperantistoj scias bone la lingvon, sciante nenion pri nomoj, pli aŭ malpli gloraj, en pratempaj kvereloj kaj disputoj; ĉu ne vere tiu historia ŝarĝo estas balasto en la nuna epoko? Nia

TAMEN... MODERNA PERSONO VIVAS MULTE PLI BONE KUN ESPERANTO

Car aktiva esperantisto mirinde posedas, kun la internacia lingvo, helan sintezon de ĉiuj moralaj kvalitoj kaj resumon de ĉio, kion la tekniko faris por la komforto de la vivo. Esperanto estas jam taŭga rimedo kreita por uzi efike ĉiujn rimedojn en internacia amplekso, ĉar per Esperanto oni estas fremda nenie en la mondo: Aviadilo kondukas samideanon al samideano, la parolo same fluas en privata konversacio aŭ en solena kongreso; kaj, sen bezono de vojaĝo nek veturo, la modela institucio de la Poŝto distribuas ĉiutage freŝan aeron de la mondo en la mondon de la propra konscienco de ĉiu esperantisto.

ESPERANTISTA GAZETARO

movado ne situas ekster la mondo, tial ĝia junularo agas same, kiel en ĉiuj aliaj fakoj de la socia vivo.

NEDERLANDA ESPERANTISTO tamburas por la XIVa kongreso de la Flandra Ligo, kiu okazis en Gento de 4a ĝis 6a de kuranta monato. Grava artikolo jene komencas: «Certe ne ĉiuj esperantistoj estas internaciistoj; sed neniu neos, ke multaj internaciistoj lernis nian lingvon kaj viciĝis en nia movado; neniu neos, ke multaj, kiuj neniam antaŭe pripensis la internaciajn problemojn, iĝis internaciistoj dank'al la esperantismo.» En lasta paĝo estas bonega artikolo de D-ro W. Manders, kun trafaj konsideroj pri la rolo de lingvo nacia kaj lingvo internacia; ĉar tiu-ĉi artikolo estas ankoraŭ daŭrigota, mi atendos la finon por aperigi longan fragmenton, kiu certe plaĉos al vi ĉiuj.

HEROLDO, kun sia aspekto de ĉiutaga ĵurnalo, informas pri la plej elstaraj okazaĵoj en nia medio. Pri la bezono de Esperanto por la sportuloj oni diras en artikolo, ke kiam turkaj sportuloj vizitis Svedion, ili devis uzi mansignan lingvon por interkompreniĝi kun la svedoj. Tamen, estas evidente, ke la dek fingroj ne sufiĉas por taŭga konversacio! Kurioza kaj loga estas la foto de du ĝemeloj ŝercemuloj, filoj de samideano en la orienta zono de Germanio, kiuj komprenas kaj respondas esperantlingve. Scivoleme, ili demandas al la rusaj soldatoj: «Ĉu vi komprenas Esperanton, onklo soldato?»

ESPERANTO, la oficiala organo de UEA, serioze rilatas al plej diversaj aferoj. Nia konata samideano Saldanha Carreira demandas en artikolo: «Kial ne neologismoj? La proza kaj poezia beletroj bezonas ilin; tio neniel malutilas la facilecon kaj logikon de nia lingvo. Esperanto posedas rimedojn, kiuj igos iam ĝian literaturon la plej bela, ĉarma kaj riĉa en la mondo». Masiva konfirmo de la optimista aserto de tiu ŝatata amiko estas la daŭra aperado de novaj libroj laŭ ritmo pli rapida ol antaŭ la lasta milito. Tial, kompatema rideto ekfloras ĉe la lipoj de esperantisto, kiam li aŭdas la stultan frazon: «Ĉu Esperanto ankoraŭ ekzistas?... Jes, ĝi ekzistas! sen bezono de la vorteto *ankoraŭ*, kaj malgraŭ la pasiveco de multaj malnovaj esperantistoj.

La ombro de mia arbo etendiĝis, la cikado silentis, kaj kiel fuŝeta heroldo de la najtingalo, ie proksime ĉirpas grilo. Se mi aŭdas la unuan kun plaĉo, ankaŭ mi gardas respekton por la humileco de la alia; ĉar ili ambaŭ, kompare kun la homoj, povas fanfaroni pri tuja kaj rekta komprenebleco kun ĉiuj najtingaloj kaj ĉiuj griloj de la tuta mondo, dum homoj el tiuj, kiuj tiel mokeme spritaĉas pri Esperanto, devas fari ofte grandajn penojn por kompreni vilaĝanon el malsama provinco de sia lando, kiam ne okazas tio kun persono el la sama distrikto. Feliĉe por la esperantistaro, dank'al nia internacia parolilo, la vasta amplekso de la universo estas eta distrikto kun unu sola lingvo, kiu ebligas la spiritan kontakton inter vi kaj via lojala servanto.

LA LEGEMA KOBOLDETO

POR QUE APRENDI EL ESPERANTO

Fuí convertido al Esperanto por el más admirable apóstol de los tiempos modernos, Ernesto Archdeacon, que fué en Francia uno de los primeros propulsores del automovilismo, la aviación y también del Esperanto.

En cierta ocasión, volviendo de unas vacaciones, encontré un folleto suyo en un montón de correspondencia; rasgué las envolturas para hacerme la ilusión de haberla leído. Me entretuve un poco más con el folleto de Archdeacon, y así fué como empecé a estudiar Esperanto.

Yo había intentado por lo menos diez veces aprender inglés, pero nunca lo logré; mis visitas a Londres me habían dejado amargos recuerdos; estaba allí como náufrago en un vasto mar, azotado por los más terribles oleajes en medio de un vendaval.

No solamente deseaba aprender a hablar en inglés; mi objetivo era hablarlo correctamente; para mí lo importante era poder pasar por un inglés, pero acabé por darme por vencido. En los almacenes, usaba los dedos para indicar las cosas que deseaba comprar, y ponía en mis bolsillos algunas monedas de oro, que yo iba entregando para que se cobrasen; el resultado era volver a mi hotel notablemente aligerado y con sólo unas monedas de cobre.

Tan sólo acerté una vez a hacerme comprender, gracias a mi colega André Picard, autor de «Jeunesse» y «Fugitive», que, no conociendo el inglés, no titubeaba, y tan sólo hablaba francés en Inglaterra. A fuerza de empeñarse, acababa por hacer comprender algo de lo que quería. Desgraciadamente, esto no ocurría frecuentemente.

Creo que fué Renan quien aconsejó a un escolar francés que iba a Londres: «Si no conoces el inglés perfectamente, es preferible que des la impresión de que no lo conoces en absoluto; entonces, los ingleses procurarán hablarte en francés y así habrás mantenido tu superioridad».

Lo malo es que los ingleses también quieran mantener la superioridad, en cuyo caso ambas partes se limitarían a contemplarse sin decir esta boca es mía, y no es esa, precisamente, la manera más suave de establecer relaciones internacionales.

Por eso aprendí el Esperanto; sus propagandistas habían repetido hasta la saciedad que no se trataba de arrinconar el idioma de cada uno, sino que, por el contrario, el Esperanto no pretendía ser más que una lengua auxiliar para todos.

Como tal puede rendir considerables servicios al facilitar relaciones comerciales, científicas y literarias entre gentes de diversas nacionalidades.

Uso la palabra «literarias» a propósito, porque este es el punto que interesa particularmente a mis colegas.

No somos perfectamente traducidos a las lenguas extranjeras; ocurre, por ejemplo, que un traductor conoce su propia lengua muy bien, pero no así la lengua francesa, yo he sufrido más de una amarga experiencia de esta clase.

Debemos traducir nuestras obras al Esperanto, y de él, someterlas a traductores ingleses, italianos, alemanes, etcétera, que conozcan el Esperanto, el cual tiene tal flexibilidad, que puede someterse a esta doble traducción sin que el idioma original pierda el menor matiz de expresión.

A este respecto, se llevó a cabo un experimento decisivo. Un texto francés, original, fué traducido al Esperanto; luego, otro traductor vertió nuevamente el texto al francés. Cuando ambos textos fueron comparados se advirtió que las diferencias eran insignificantes, cosa difícilmente lograble al utilizar otros idiomas.

TRISTAN BERNARD

Traducimos de «Amerika Esperantisto» este artículo del famoso comediógrafo francés, fallecido el año 1947, y que aprendió el Esperanto, con gran entusiasmo, bastante antes de la primera guerra mundial.

La mejor manera de favorecer al Esperanto en España es inscribiéndose en HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

Socio de número ...	12	ptas. anuales
Socio abonado.. ...	25	» »
Socio protector... ...	50	» »

Las dos últimas categorías dan derecho a la recepción de nuestro «Boletín»

LA VOJO AL LA VENKO

Jam de multaj jaroj, tuj post la naskiĝo de Esperanto, ĉiuj esperantistaj gazetoj, naciaj kaj internaciaj, amplekse pritraktis unu saman temon de ĉiuj eblaj vidpunktoj. Oni defendis la plej diversajn opiniojn, ĉiuj pravaj, certagrade, pri la maniero venkigi nian karan lingvon kaj efektivigi la belan idealon de Zamenhof. Tamen mi kredas, ke oni ne sufiĉe atentis vojon, kiu ne estas la sola, sed eble la plej rekte kondukanta al nia celo.

Oni devas konfesi, ke oficiala akcepto de Esperanto kaj ties enkonduko en la lernejojn, fare de unu aŭ pluraj registaroj, estus granda progreso kaj estigus multajn ŝancojn por ke aliaj imitu la ekzemplon. Pro tio oni ne devas laciĝi nek malesperi pro ŝajnaj malsukcesoj ; tute male, oni devas obstine insisti kaj provi impresi la altajn instancojn pri la seriozeco kaj graveco de la lingva problemo kaj de ĝia sole vera solvo pere de Esperanto. Finfine, eĉ se niaj tiurilataj klopodoj fiaskas, oni ne povas nei, ke ili almenaŭ memorigas la registarojn pri la ekzisto de nia lingvo, kiun la teruraj batoj ricevitaj dum du mondmilitoj ne povis malaperigi.

Tamen, humile mi opinias, ke ni mem, la simplaj esperantistoj, havas la eblon atingi la efektivan triumfon, nur se ni ĉiuj entuziasme kaj senlace plenumas nian devon. Efektive, ni rimarku, ke nia afero povas triumfi laŭ du tute malsamaj vojoj : nome, ke la registaroj akceptu kaj altrudu ĝin al siaj popoloj, aŭ ke la popoloj akceptu kaj altrudu ĝin al siaj registaroj. Ke oni neniel devas maltaksi la unuan vojon, mi ja ne kuraĝos diskuti, sed mi estas plene konvinkita, ke la dua kondukos nin al la celo pli rekte kaj pli rapide.

Esperanto estis kreita, kiel solvilo por jam de longe ekzistanta problemo, sed ni ne forgesu, ke tiun problemon multe pli altgrade sentas popoloj ol registaroj. Diplomatoj povas pli malpli bone interkompreniĝi per franca, angla, hispana aŭ alia nacia lingvo, sed ordinara popolano ne ĉiam havas la eblon ellerni fremdan lingvon, do estas li, kiu plej multe bezonas Esperanton.

Estas pripensinde ĉu konvenas, ke ni pafu la sagojn de nia propagando al tiuj privataj popolsektoroj, kiuj, pro lia medio, profesio aŭ agadkampo, devas alrigardi trans la landlimojn. Mi konsilus iri rekte al ili kaj montri, ke Esperanto estas ilia savilo. Tiele, se ĉiu esperantisto farus sian eblon ,la nombro da esperantistoj en la mondo facile centobliĝus post kelkaj jaroj, kaj ni havus vere imponan esperantistan popolon, kiu povus altrudi la lingvon al la malcedemaj registaroj.

Oni povus multe skribi pri la temo, kiu certe estas interesa, sed mi kredas, ke tiu ĉi skizo sufiĉas. Ni ne preterlasu la okazojn agadi en oficialaj instancoj, sed ni ĉefe atentu la plej bonan grundon ; kiu ne alia estas ol mem la popolo.

ELFO

EL ESPERANTO Y LA PRENSA ESPAÑOLA

La prensa diaria se ocupa ya con más frecuencia del idioma internacional comentando favorablemente los progresos del Esperanto en las más diversas actividades de la vida moderna. Nuestro estimado amigo, el profesor D. Delfín Dalmau, nos envía la copia de unos comentarios publicados el día 25 del pasado Mayo en el importante rotativo de Barcelona «La Vanguardia Española».

Dice así: ANTENA EXTRANJERA.—«No deja de ser curioso comprobar la profusión de las emisiones transmitidas en Esperanto. La Radiodifusión Francesa y diversas emisoras europeas —como la sueca de Malmö— difunden regularmente programas en tal idioma. El Congreso Internacional de Esperantistas, que se reunió en Suecia el verano pasado, abogó por el incremento de tales emisiones y se interesó en la aportación de la radio a su proselitismo».

También en otros periódicos han aparecido reseñas y comentarios de los que iremos dando cuenta oportunamente. De momento solo queremos expresar públicamente nuestro agradecimiento por la objetividad mostrada, que es un mérito más, entre los muchos que tiene ganados el periodismo español.

ESPERANTO KIEL PERANTO INTER INFANOJ KAJ ILIA PATRINO

Du finnaj infanoj, knabino kaj knabo, estis antaŭ kelkaj jaroj adoptitaj de du danaj familioj. Du jarojn poste la patrino vizitis ilin en la danaj hejmoj; sed, ho ve! la infanoj jam forgesis la finnan ligvon, kaj tial ke ilia patrino ne sciis la danan lingvon, la patrino kaj ŝiaj infanoj tute ne povis interkompreniĝi. Dana adopto-patrino proponis tiam, ke ili ĉiuj eklernu Esperanton. Tio okazis; la infanoj jam ricevis la unuan leteron de sia patrino. Esperanto estas do, por ili ĉiuj, la sola komprenebla lingvo.

El Dansk Esperanto-Blad

Ricevitaj libroj

JARLIBRO DE U. E. A. 1949.—La lasta Jarlibro de la unueca tutmonda Organizo de la Esperanto-Movado, bildigas la konstantan progreson de nia afero en la tuta mondo. La delegitaro senĉese pliampleksiĝas kaj la membraro ĉiam kreskas, spite de la malfacilaĵoj, kiuj malebligas la membrecon al samideanoj de pluraj landoj, pro la neebleco ellandigi monon kaj pagi la koncernajn kotizojn.

Estas kontentige konstati, ke la diversaj servoj de U. E. A. daŭre perfektiĝas kaj havigas al la membraro efektivan profiton, ebligante praktikan uzadon de la lingvo. La informoj pri la landaj movadoj ankaŭ spegulas atentindajn progresojn.

En la Jarlibro estas troveblaj precizaj informoj pri landaj Asocioj kaj Esperanto-gazetoj, sed mankas citaĵo pri Hispana Esperanto-Federacio kaj nia BULTENO, eble ĉar la informoj pri nia definitiva ekfunkciiĝo trafis la Centran Oficejon tro malfrue, kiam la materialo estis jam liverita al la presejo.

Resume, ni devas montri nian kontenton pri tiu utila ĉiujara broŝuro, kies posedo estas nepre necesa al ĉiu aktiva membro de UEA.

ETULO

ANONCETOJ

Ni akceptas anoncetojn kiuj rilatos al nia afero. Unu peseto au unu r-k. validas por du vortoj. Tri mallongigaj literoj valoras kiel unu vorto.

DR. HERRERO. Calvo Sotelo, 17. Valencia. Dez, koresp. kun Islando, Usono, kaj kun sefarditoj. Pri ĉ. t.

SR.º JULIO HURTADO. Camino Real de Madrid, 19. VALENCIA. Dez. 3, uzitajn p. m.

E. MARTINEZ. Generalísimo, 77. CHESTE (Valencia). Dez. teknikajn rilatojn kun konstruistoj kaj arkitektoj en Anglio, Italio kaj Ameriko.

DR. E. TUDELA.—Ruzafa, 43. Valencia. Dez. koresp. kun ĉiulandanoj pri div. temoj. Respondo garantiata.

DENTTEKNIKISTOJ!—S.º Ricardo de Luna, dez koresp. pri metiaj k. ĝen. aferoj kun eksterlandanoj. Paseo de Colón, 5, 1.º, 2.ª Barcelona (Hispanio).

GEEDZIĜO

Nia juna kaj simpatia amiko Francisko Roglá, estrarano de nia Federacio, edziĝis pasintan monaton kun la ĉarma fraŭlino Carmen Albiol. Plej sincere al ili ambaŭ ni esprimas nian gratulon dezirante, ke la feliĉo, kiu nun brilas en la nova hejmo de tiel bonaj geamikoj, estu eterna sur la firma garantio de la amo plej perfekta en plej bela harmonio.

Pri administrado kaj redakciaj aferoj de nia BULTENO, adresu ĉion al: HISPANA ESPERANTO FEDERACIO Ruzafa, 7 — VALENCIA (Hispanio).